CHECOSLOVAQUIA — "Verda Ĉaro de Julio Baghy", o grupo teatral de Praha Esperanto-Klubo, representou com

grande sucesso o notável drama social em 3 atos — "Nora" ("Casa de boneca"), de Henrik Ibsen. Escrito em 1879, mas de plena atualidade, foi êste drama traduzido em Esperanto por Eva Seemannová, que também representou impecavelmente o papel de Nora, a espôsa do advogado Helmer.

CHINA — A Imprensa Comercial editou novo dicionário Esperanto-chinês, em formato de bôlso, com 333 páginas.

ESTADOS UNIDOS DA AMÉRICA DO NORTE — Há várias localidades norte-americanas, que têm nomes em Esperanto. Eis alguns: *Alta* (Iowa); *Amo, Disko* (Indiano); *Bona, Rondo* (Montana).

GRÉCIA — Após 6 anos de pausa, o dr. Stamatiadis, pioneiro do Esperanto na Grécia, conseguiu reeditar o antigo órgão da Helena Esperanto-Asocio, sob o título de "Esperanto kiel lingvo kaj ideo".

Em inquérito feito há pouco tempo entre 81 prefeitos do país, foram todos êles favoráveis à propaganda intensiva do Esperanto.

O governo da Grécia decidiu adotar em todo o país o sistema decimal de pesos e medidas. Em abril de 1959 o metro substituiu o "pikhi" e em julho o quilograma substituiu o "oke".

INGLATERRA — Por 1300 votos (e 1 só voto contra) a Assembléia Geral da Universidade de Oxford decidiu que os candidatos à matrícula na Faculdade de Ciências poderão entrar em exame sem conhecer o latim e o grego, o que rompeu uma regra que era aplicada rigorosamente há quase mil anos.

IUGOSLÁVIA — Em Split foi construído e lançado ao mar um navio de passageiros, a que foi dado o nome *L. L. Zamenhof*. É de propriedade da Linha Oceânica Pelinza, em Gdynia.

JAPÃO — De 28 a 31 de agosto de 1959 realizou-se em Tóquio o 46.º Congresso dos Esperantistas Japoneses, comemorando o Centenário de Zamenhof.

Pela minuciosa descrição das sessões e dos trabalhos do Congresso, segundo relato de "La Revuo Orienta", de novembro, foi êle um verdadeiro sucesso, pelo qual felicitamos os esperantistas do Japão.

A bibliografia da literatura médica em Esperanto, recentemente editada em

PAROLADO DE MALBA TAHAN EN UBÁ

Bonegan paroladon pri la lingvo Esperanto faris, la 14-an de julio, la konata verkisto Malba Tahan (Prof. Júlio Cesar de Mello e Souza) en Ubá, progresema urbo el la Stato Minas Gerais, en la aŭditorio de la Kolegio *Sacré Coeur*. Inter la ĉeestantaro oni rimarkis multajn profesorojn kaj instruistojn, kiuj venis al tiu urbo pro la perfektigaj kursoj starigitaj de la Ministerio de Edukado kaj Kulturo. Ankaŭ ĉeestis grandanombre sinjorinoj kaj sinjoroj loĝantaj en la urbo, inkluzive aŭtoritatuloj invititaj de la Esperanta Klubo de Ubá. Al Brazila Klubo Esperanto kaj al Prof. J. B. de Mello e Souza la Klubo sendis la jenan telegramon: "Plezurege mi sciigas vin profesoro Malba Tahan faris en la 14-a profitan belegan paroladon favore al nia movado. Elkorajn salutojn. Edina Reis, sekretario Esp.-Klubo".



La esperantistoj donacas al Malba Tahan memorigaĵon kiel dankeman montron



Aspekto de la ĉeestantaro kiam paroladis Malba Tahan

Tóquio, menciona 147 ensaios, cujo original foi redigido em Esperanto, 841 resumos e 22 dicionários técnicos relativos a 22 ramos diferentes da medicina.

POLÔNIA — Pola Esperanto — Asocio, de Varsóvia, preparou duas medalhas, de bronze e de prata. No anverso há a efígie de Zamenhof e as palavras: "Ludoviko Zamenhof-aŭtoro de Espe-

ranto — 1859-1917". E no reverso: "Omage al Zamenhof en la centjara datreveno de la naskiĝo-Varsovio — MCMLIX".

RŪSSIA — Pela primeira vez, depois da morte de Stalin, a Rádio Moscou fêz uma transmissão direta em Esperanto, irradiando um discurso do intelectual S. Saryeev.

? LA MISTERO

ROMANO

*Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Me-
deiros e Albuquerque, Viriato Correia.*

XXXIX

LA MISTERA DOMO

La dekunua nokte jam estis pasinta. En la dometo de la strato Paulino Fernandes oni aŭdis diskretan frapadon ĉe la pordo.

S-ino Bibi, onklino de Lucinda, kiu en la manĝoĉambro aranĝis la domon antaŭ la enlitiĝo, kiel faras ĉiuj bonaj dommastrinoj, haltigis sian laboron kaj atente aŭskultis. Lucinda, kiu en la apuda ĉambro kombis al si la harojn por la nokto, aperis ĉe la koridoro.

— Oni frapas, onklino. Ŝajnas, ke ĝi estas ĉi tie.

— Vi pravas. Sed tiel malfrue... Ne, ĝi ne povis esti.

Ambaŭ starante aŭskultis. Denove oni frapis.

Ne estis dubo — ĝi estis ĉi tie. S-ino Bibi trapasis la koridoron, eniris en la saloneton, sin direktis al la fenestro kaj demandis tra la persieno.

— Kiu estas ?

Iu ekstere alproksimiĝis al la persieno kaj diris:

— Ĝi estas de la policejo. La delegito petas F-inon Lucinda, ke ŝi iru tuj al la distrikta policejo.

S-ino Bibi ektemis. Apud ŝi Lucinda ankaŭ ektemis.

— Al la distrikta policejo ! ?

Ambaŭ rigardis unu la alian en la malhelo de la ĉambro ne bone lumigita de la malforta lumo de la strato.

Lucinda faris decidon. Kuraĝe ŝi

malfermis la persienon kaj rigardis eksteren. Ĝi estis policisto staranta en la malgranda ĝardeno apud la fenestro. Vidinte ŝin li levis la manon al la kepo kiel saluto.

— Ĉu la delegito vokas min ? ŝi demandis malbonhumore.

— Jes, fraŭlino.

— Diru al li, ke mi iros morgaŭ matene.

— Neeble, fraŭlino, Ĝi estas ordono.

— Sed, ĉu ĝi estas horo por voki fraŭlinon, ke ŝi iru al la policejo ?

— Mi ricevis ordonon.

— Iru, kaj diru al la delegito, ke mi ne povas iri nun.

— Paciencon, fraŭlino. Mi havas ordonon konduki vin.

— Sed, kio okazas ?

— Mi ne scias, fraŭlino. Temas pri la polica demandado rilata al la bankiero.

— Tio ne koncernas min.

— Certe jes, fraŭlino.

— Oni ja arestis la krimulon, ĉu ne ? Pro kio do ili vokas min ?

— Nur la delegito scias. Vi iros kaj li klarigos.

— Ĉu fakte mi ne povas ne iri nun ?

— Vi ne povas.

Lucinda turnis la kapon internen en la ĉambro kaj denove rigardis S-inon Bibi.

— Kion fari, onklino ?

La maljunulino estis sendecida pri la respondo. Poste ŝi paŝis al la policisto.

— Sinjoro, diru al la delegito, ke ŝi estas malsana.

— Mi ne povas diri tion, sinjorino, ĉar efektive ŝi estas sana. Kaj fine mi estos punita.

La onklino kaj la nevino hezitis dum momento.

— Kio estas farenda ?

— Estas nenia alternativo, ni nepre devas iri, diris S-ino Bibi, ni iru vesti nin.

— Vi povas foriri, diris Lucinda al la policisto. Informu, ke ni iros tuj.

— Mi atendos vin.

— Ne estas necese. Ni iros solaj.

— Sed mi venis per aŭtomobilo ĝuste por konduki vin.

— Envenu do.

— Mi restos ĉi tie.

— Envenu almenaŭ en la koridoron. Pluvetas.

— La policisto pro la insisto eniris en la ĉambron. Lucinda kaj S-ino Bibi iris interne sin vesti. Post dek kvin minutoj ili revenis.

La strato estis senhoma. Estis aŭdata la fajfado de la nokta gvardio malproksime. Kun la domoj tute fermitaj ĝi aspektis en tiu horo kva-zaŭ vilaĝa strato.

— La veturilo estas tie, sinjorinoj.

Ili sin direktis al la aŭtomobilo. Lucinda kaj S-ino Bibi enveturiliĝis, la policisto fermis la pordon kaj si-diĝis apud la ŝoforo.

La veturilo kuris rapidege.

La mieno de Lucinda montriĝis ĝenata. Sulko vidiĝis sur la bela vi-zaĝo de la blonda virino. Kio estis okazonta? En la brusto ŝia koro batis maltrankvile. Ŝi antaŭsentis ion malbonan. Tra la vitraj fenestroj de la aŭtomobilo nun fermitaj pro la pluvo, ŝi ne povis vidi la stratojn. Sed laŭ ŝia supozo la distrikta policejo jam estis preterpasita.

Ŝi atendis dek minutojn pli. La aŭtomobilo nun ne iras tiel rapide. La veturilo terure skuigis. Kredeble ĝi trapasis malbone pavumitan straton.

Lucinda prenis la manon de sia onklino.

— Kien ni iras?

Ankaŭ ŝi ne sciis. Malkvietiĝo kaptis ambaŭ virinojn. Ili sentis, ke

ili supreniras altaĵon. Lucinda ne sin detenis plu: ŝi alproksimiĝis al la vitroj de la aŭtomobilo proksime al la ŝoforo, kaj ekfrapadis.

Nek la ŝoforo nek la militisto sin movis. Nun la aŭtomobilo malsupreniras kaj kuregas ĉe longa marbordo, kiu tamen ne estas la marbordo Botafogo.

Lucinda kriegis frenezece. Sed ŝi sentis, ke ŝia voĉo ne trapasas la fermitajn fenestrojn.

Ŝia nerva incitiĝemo pligrandiĝis. Frapante furioze la vitrojn per la tenilo de ŝia ombrelo ŝi rompis ilin. Sed en tiu sama momento la aŭtomobilo haltis.

La policisto venis kaj malfermis la pordon.

La du virinoj fariĝis senmovaj kaj terurigitaj. La loko, kie la aŭtomobilo haltis estis ombroplena, malhela kaj senhoma. Sendube ĝi estis tre malproksime de la urbo. Oni eĉ havis la impreson, ke tiu loko troviĝas en plena kamparo. En la ĉirkaŭaĵo neniu domo, nur densa arbaro kaj longa sabla vojo malsekigita de la pluvo.

— En kiun lokon vi kondukis nin? demandis Lucinda al la policisto.

— En la lokon ordonitan de la delegito, li respondis.

— Ĉu la distrikta policejo estas ĉi tie?

— Sed ĝuste ĉi tie la Polico faras esploradon.

— Kaj nun?

— Volu akompani nin, sinjorinoj.

Ili obeis. La arboplantita vojo finiĝis apud malnova, blanka domo de kolonia arkitekturo ankaŭ cirkaŭita de tre grandaj arboj.

— Ni eniru, invitis la policisto. La delegito estas en la domo.

BRAZILA KRONIKO

BAHIA

Salvador — La grava ĉiutaga gazeto *A Tarde* (La Vespero) publikigas originalajn Esperantajn verkaĵojn en portugalan lingvon de nia klera samideano. L. H. Knoedt. El ili ni mencias *A estudante*, de Marjorie Boulton kaj *Vida e Morte de Wiederboren*, de Clelia C. Guglielminetti.

MINAS GERAIS

Caratinga — Nia samideano Ivan Moreira (Lernejo S. Domingos de Gusmão) presigas en sia duonmonata lerneja gazeteto sciigojn pri Esperanto. Gratulon kaj dankon!

Governador Valadores — La direktorino de la "Biblioteca Pública Municipal de Governador Valadares" komunikis al ni la inaŭguron, la 30-an de januaro, de tiu komunuma biblioteko. Ĝi jam posedas ĉirkaŭ 7.500 librojn, kaj inter ili kelkajn Esperantajn verkaĵojn, kaj tre deziras, ke oni donacu al ĝi pli da Esperantaĵojn.

Kaj li iris antaŭe, sekvata de la sinjorinoj.

Ĉe la pordo, en koridoro longa kvazaŭ tio de monaĥejo li frapis per la fingroj unu, du tri fojojn kaj tri fojojn ripetis la frapadon.

La pordo malfermiĝis. La policisto pelis Lucindan kaj S-inon Bibi internen.

La du sinjorinoj sin apogis al la muroj por ne fali. Ili troviĝis en granda lumigita ĉambro, kiun ses maskitaj viroj silente gardis.

Viriato Correa
Tradukis Y

Funkcias en ĝia sidejo elementa Esperanto-kurso, kiun gvidas nia samideano Hudson Ferry.

STATO RIO DE JANEIRO

Nilópolis — Ĉe la ĵus fondita Norma Lernejo "Santa Angela", aneksaĵo de Kolegio Nilopolitano, komenciĝis, la 7-an de marto, kiel parto de la Norma programo, kurso de Esperanto, kiun gvidas nia samideano João G. Alcoforado.

Resende — Resende Esperanto-Klubo eldonas organon "KTP", kies direktoroj estas niaj samideanoj Olivio Storte kaj Wilson Mattos Silva.

Volta Redonda — Volta Redonda Esperanto-Klubo reelektis sian estraron: Prez. Inĝ. Alberto Flores; Vicprez. João Andrade; 1-a sek. Antônio Barbosa; 2-a sek. Inĝ. Eurico João Laux; Kas. João Rodrigues; Bibl. F-ino Mariza Gambo.

La klubo kunvenas merkrede kaj vendrede. La Inĝeniera Asocio de Volta Redonda multe kunlaboras kaj helpas. La klubo mimeografis 250 ekzemplerojn de portugala traduko de la verkaĵo de prof. Giordano Canuto: — "O uso da língua internacional no campo técnico-científico".

SÃO PAULO

Jundiaí — Nia sindona samideano Oscar Hoff faras E-kurson, kiun frekventas ĉirkaŭ 40 gelernantoj. La instruisto sekvas la programon de la Komunuma Lernejo de Esperanto, en la ĉefurbo. Unu el la lernantoj, s-ro J. Tinoco Filho, komencis jam lernigi elementojn de nia lingvo al kelkaj geknaboj, kiuj poste povos ĉeesti la kurson.

Santos — Frei Oswaldo Hedeman, Ord. Carm., vicdirektoro de la lernejo "Escola Técnica de Comércio N. S.

do Carmo" gvidas elementan E-kurson al la lernantoj de la unua klaso de la Baza Komerca Kurso.

Sorocaba — Ĉe União Espirita Sorocabana funkcias ĉiulunde vespere elementa E-kurso, sub la gvido de s-ro Manoel Blaz Garcia.

Jen la unua estraro de jus fondita Sorokaba Esperanta-Klubo: Honora prezidanto — João Cândia Pereira; prez. Manoel Blaz Garcia; vic-prez. Nelson Almeida Proença; sek-prof-ino Olívia Catuzzo; 2-a sek. prof-ino Elvira Paschoal; kas. prof-ino Odette Sellberg; 2-a kas. Antônio Freire; propag. José Scaciota. Anstataŭantoj Mario A. Pellegrini, Edson Raszl, Benedito Barbosa.

RIO GRANDE DO SUL

Pôrto Alegre — Ni eksciis pri la nova adreso de Esperantista Societo de Pôrto Alegre: Rua Riachuelo n-ro 383-6.º andar, sala 62. La poŝtkesto estas la sama: 1415. Ĝi estas malfermita ĉiutage de la 6-a ĝis la 7-a horo, vespere. Kunvenoj: marde, post la 8 h. 30, vespere.

Cachoeira do Sul — S-ro Armindo Trarbach komunikis la starigon de Esperantista Societo de Cachoeira do Sul — ESCA, kiu funkcias ĉe la Komunuma Lernejo pri Belartoj. Tie oni faras elementan E-kurson.

Rio Grande — S-ro Dirceu Porciúncula sciigis nin pri solena kunveno memoriga de la centjaro de doktoro Zamenhof (15 decembro) en la Centro Esperantista Kardecista.

UNESCO E ESPERANTO

Courier, a revista oficial de Unesco, editada em inglês, francês e espanhol, traz no número 12 de 1959 interessante, bem escrito artigo de Françoise Niderhausen, com material fornecido pelo "Centro de Esploro Kaj Dokumentado", sôbre "Zamenhof, pai do Esperanto".
(*Interlingvistika Informa Servo*)

NASKIĜOJ

Milda estas la nomo de filino de niaj gesamideanoj D-ro Hyzo Gondeberto dos Santos kaj Idalina Castro dos Santos. Ŝi naskiĝis en la urbo Floresta, ŝtato Paraná, la 31-an de majo.

La 3-an de julio novan filineton Suéle Diacui Sá gajnis nia samideano Eléus Leonardo de Sá kaj lia edzino Tereza Soares de Sá.

NEKROLOGO

Pedro de Aquino Xavier

La 1-an de decembro 1959 mortis subite nia sindona, estimata amiko Xavier, delegito de U.E.A. pri radio kaj amatorismo. Lia neatendita forpaso tre kortuŝis liajn B.E.L. — samideanojn.

Cândido Bravo

En la aĝo de 59 jaroj mortis la 15-an de marto en la ĉefurbo São Paulo, la Polica Kolonelo Cândido Bravo, prezidanto de S. Paulo Esperanta Klubo kaj ĝenerala direktoro de la Komunuma Lernejo de Esperanto. Granda amiko de Esperanto, li multe laboris super nia lingvo.

Gravan perdon suferis la esperantistaro de S. Paulo pro lia forpaso

K. R. C. Sturmer

La 18-an de marto mortis subite en Londono la klera esperantisto Kenelm Robinson C. Sturmer, 57-jara, denta teknikisto. Inter liaj Esperantaj originalaj verkaĵoj estas menciindaj "Se Grenereto..." (1930), "Por Recenzo" (1930), "El la Notlibro de Praktika Esperantisto" (1934).

VICTOR INN

J. B. MELLO E SOUZA

(Al miaj brazilaj samideanoj)

El la libro "História do Rio Paraíba" (Rakontoj el la bordoj de la rivero Paraíba) tradukis Foriano Pessoa.

Kia mistera kaj stranga persono estis tiu Victor Inn! Ke li ne estas itala, kiel tiom da aliaj fremduloj, tiutempe enmigrantaj en nian landon, tion oni tuj povis vidi. Li estis ankoraŭ juna — eble ne tridekjara —, kiam unu tagon li aperis en Queluz (*), kun la preteksto, ke li serĉas laboron ĉe iu entrepreno aŭ bieno, por kies mastro li alportas rekomendan leteron. Tamen, ii vane traesploris la poŝojn kaj sian malgrandan vojaĝosakon: nenion li trovis, kio povus pravigi lian ĉeeston en la urbo. La leteron li perdis — se oni supozas, ke vere ekzistis tia dokumento —, kaj li eĉ ne memoris la nomojn de la bieno kaj de la adresato.

Victor Inn estis simpatia homo, maigraŭ tio, ke kelkaj el liaj fizionomiaj trajtoj laŭŝajne vidigis intimajn ĉagrenojn aŭ sentojn de ribelo kontraŭ la maljustaĵoj de l' destino kaj la malbonŝancoj de la vivo. Li estis flavruĝa, kun bluaj okuloj kaj ĉiam nerazita vizago. En tiu epoko venadis Brazilon tiom multe da emigrintoj el Suda Eŭropo, precipe el Italujo, ke estis neniel mirinde, se inter ilin enŝovigis iu ĉeko aŭ germano, de mizero elpelita el sia hejmo kaj deziranta trovi novan patrujon ĉe nia gastama kaj bona lando.

Pro nezorgemo aŭ kompatato la aŭtoritatuloj ne ĝenis lin kaj la stranga eksteriandano ekloĝis en

Queluz, tranoktante en kafotenejoj kaj perlaborante la necesan monon per malgrandaj negocoj. Li restadis en la stacidomo kaj tie akceptadis la personojn, kluj bezonis servojn. Sobre kaj pace li vivis; oni ne vidis lin en akompano de sentaŭguloj aŭ senokupaj homoj kaj li ankaŭ ne partoprenis la rondon de la kutimaj klientoj de ia tieaj drinkejoj. Komence li parolis itale, eble unu el la diversaj dialektoj de la lingvo de l' "bel canto"; ŝajnas al mi, tamen, ke li enmetis vortojn kaj esprimojn, ĝin miksis kun vortoj kaj esprimoj de alia idiomo, tiel ke oni kelkfoje preskaŭ ne komprenis, kion li volas diri. En kelke da monatoj li lernis la portugalan lingvon, kio efike kunhelpis por la plibonigo de liaj vivkondiĉoj, en lia nova lando.

— Tiu viraĉo ne ŝajnas deca persono, diradis Carlos Rivera, parolante kun amikoj, ĉe la enirejo de la urba ponto. Ĉiuj enmigrantoj kutimas paroli pri siaj familioj kaj devenlandoj, kaj pliboniginte sian financan staton, ili tuj venigas siajn edzinojn kaj filojn. Pri tiu Vitorino oni tamen nenion scias: nek de kie li venis, nek kien li iros...

— Nu, konjektis Chico Mascate — tio nenion signifas. Eble li malpacigiĝis kun la familio, tio estas natura afero. Mi eĉ petis al li, ke li ricevu por mi monon en Areias kaj en Barreiros, kaj li akurate reguis la aferon. Li ŝajnas al mi bona homo.

— Mi opinias, ke li estas "Bibliano" — flustris alia.

Tiamaniere estis nomataj la adeptoj de la protestantismaj sektoj.

Malsamaj estis do la opinioj pri Vitorino. Efektive, tuj de la komenco li konatiĝis en la tuta urbo kie Vitorino, kaj tiel, en unu solan vorton kunfandiĝis la du elementoj formantaj lian veran nomon.

Unu tagon, en la apoteko de Garcez, vidante malnovan horloĝon

(*) prononcu: Kelus'

movitan per peziloj, kiu de kelkaj jaroj ne funkciis kaj pro tio estis forlasita kiel senutila balasto, Vitorino proponis, ke li ekzameni la difektitan maŝinon, kaj klopodu ĝin refunkciigi, se tio estas ebla. La entrepreno estis ne facila, sed la lerta fremdulo ĝin tre feliĉe plenumis. Li nenur reguligis la malnovan maŝinon; li ankaŭ purigis la ciferplaton malheligitan de polvo, refaris la romajn ciferojn kaj ties ilustraĵojn, kaj uzante substancojn, kiujn la apotekisto liveris al li, rehavigis al la pendolo, al la montriloj kaj metalaj ringoj ilian iaman brilon. Li fine lakis la lignan ujon, laŭeble forigante la domaĝojn kaŭzitajn de la tempo kaj de la termitoj.

— Ĉu vi jam vidis, kiel estas nun la horloĝo? — demandadis Zéca da Farmácia al la vizitantoj. Ĝi aspektas tute nova! Vitorino estas tre sperta pri riparado de tiaj maŝinoj!...

Ĉiuj vidis la mirindaĵojn kaj konvinkigis, ke ĝi estas vera. La apotekisto, kontenta kaj fiera, antaŭenigis la montrilojn, por ke liaj amikoj aŭdu solenajn, malrapidajn sonfrapojn, per kiuj la horloĝo signalis la horojn kaj kiujn ĝi aŭtomate ripetis tuj poste.

Tia rimarkinda kapablo, ne ekzistanta ĉe ordinaraĵoj horloĝoj, estigis en nia juna spirito grandegan admiron.

Tiu fakto signis la komencon de nova fazo en la vivo de Vitorino. Forlasinte la iamajn krudajn laborojn li fariĝis riparisto de maŝinoj, generale, kaj de horloĝoj speciale.

Diversaj bienposedantoj proponis, ke li riparu malnovajn aparatojn, sendube similajn al la respektinda relikvo, pri kiu la apotekisto estis tiel fiera.

La financa stato de Vitorino plibonigis; lunte maigrandan ĉambron en unu el la antikvaj domoj, ĉe la altaĵo apud la ĉefpreĝejo, li tie

instaligis. Memvola mizantropo, li tie vivadis tutsola, izole, silente laborante. Mi kaj miaj fratoj — tiutempe ankoraŭ knaboj de tempo al tempo vizitis lin por iom interparoli. Ni plezuris vidante lin ĉe sia labortabio, kun lenso ĉe la okuloj, malmuntantan poŝhorloĝojn; ŝajnis al ni neeble, ke li poste remetos en iliajn lokojn ĉiujn maigrandegajn pecojn de la komplika maŝino.

Pli ol unu fojon Vitorino iris al Sŝo Paulo aĉeti laborilojn, kiujn li bezonis. Renkontante lin, kiam li revenis el unu el tiaj vojaĝoj, kaj rimarkinte, ke li estas pli gajmiena kaj pli bone vestita, Bigeu, ĉiam sprita kaj bruema — ekkriis:

— Brave, Vitorino! Mi ĝojas, ke mi vidas vin tiel forta, sana, kun razita vizaĝo kaj pli bonaj vestoj!...

Neniu ignoris, ke Vitorino jam posedas iom da mono, dank'al lia sobra kaj laborplena vivo.

— Li certe faras al si ŝparaĵon por instali sin en S. Paulo — ĉiuj diradis.

Dum unu el la vizitoj, kiujn ni kutime faris al li, la modesta horloĝisto kun mistera mieno deklaris:

—En S. Paulo mi aĉetis ion, kion vi plezure vidos. Atendu iomete.

Post kelke da minutoj li revenis el la interna parto de la domo, alportante malgrandan muziko-skatolon. Streĉinte la aparaton li diris, antaŭ oi ĝin ekmovigi:

— Aŭskultu... Kia belega melodio!

Kaj ni ravoplenaj aŭdis la subtilajn notojn kiujn eligis la ĉarma muzikilo — ian melankolian popol-kanton el la malnova Eŭropo — vere delikata filigrano el sonoj ĝi estis kvazaŭ sonora sintezo esprimanta profundan sopiron al la fora patrolando, al la silentaj, neĝokovritaj montoj kaj kvietaj lagoj, sur kies supraĵo respeguliĝas majestaj ulnoj kaj imponaj nobeidoj.

Tuj poste aŭdiĝis alia kantaĵo, pli gaja kaj vigla; oni povus diri, ke la neĝon de l' montoj anstataŭis verdaĵo de kampoj, flugado de hirundoj kaj infanaj voĉoj feliĉe kantantaj. Ni du-trifoje aŭdis tiujn ĉarmajn alpajn kanzonojn, ĝis ni ilin lernis parkere.

— Kion signifas ĉi tio? — mi demandis montrante gotikan skribaĵon, kiu vidiĝis sur unu el la flankoj de la skatolo.

— Tio estas la nomoj de ĉi tiuj kantaĵoj — klarigis Vitorino. La unua linio signifas: "Ho, mia bela patrujo", kaj la dua: "Dum ludotempo". La gravuraĵo montras Ŭtliberg-on, grandegan monton en Svislando.

— Kaj kiu estas ĉi tiu rivero?

— Ĝi ne estas rivero, knabo mia. Atentu bone... En Svislando ne ekzistas tia larĝa rivero. Kion vi vidas, estas parto de la lago Zurich.

La malgaja muziko de la kantaĵo kaj la brulpentrita pejzaĝo vekis, ĉe la sentema animo de la horloĝisto, dolĉajn rememorojn pri lia patrolando, kaj li entuziasme parolis pri ĝi, pri la glora Svislando de Vilhelmo Tell, de Winkelried, de Pestalozzi. Li priskribis al ni ĝiajn lagojn, montojn kaj intermontojn.

Mia plej juna frato, Rubens, rapide iris al nia domo kaj revenis kunportante lernejan landkartaron. Malferminte la libron ĉe la paĝo kie estis Svislando, Vitorino montris, uzante lenson kiu pligrandigis la geografiajn akcidentojn, la precizan lokon kie staras Ŭtliberg, la urbo Zurich kaj la lago, kies poezian belecon li iaŭdegis.

— Ĉi tie — li diris signante montaran regionon pri kiu estis nenia klarigo en la karto — ĉi tie estas la urbo Einsideln, kie mi naskiĝis.

Kaj li daŭre faris aliajn konfi-

OPINIÃO DE DOM JAIME DE BARROS CÂMARA, CARDEAL ARCEBISPO DO RIO DE JANEIRO

"Convidado como membro da Comissão Patrocinadora Internacional do Esperanto, a manifestar-me sôbre o centenário de Zamenhof, quero embora em poucas palavras, juntar a minha voz à de quantos têm sabido exaltar o esforço do fundador do Esperanto, de proporcionar aos homens de tôdas as partes do mundo uma forma de se entenderem mutuamente, através de um idioma comum: a Língua Internacional o Esperanto."

dencojn, parolis pri sia familio, pri okazintaĵoj el sia infaneco. Bonegalando ĝi estis! Ĉiuj vivis tiel feliĉaj!

Unu el ni kuraĝis fari demandon, pri kiu la aliaj certe jam estis pensintaj.

— Sed — ho Vitorino — kial vi migris en Brazilon?

La fizionomio de la horloĝisto subite transformiĝis. Ni tiam ekkonsciis, ke la demando tuŝis doloran kaj impreseblan punkton de lia koro.

— Ha, infanoj, ĝi estis pro tre grava motivo, vere tre grava! Mi devus ne paroli pri ĝi al iu ajn, kaj ankoraŭ ne faris tion, sed vi estas miaj amikoj, kaj promesŭ ne perfidi la sekreton, ĉu jes? Aŭskultu, mi tion diros al vi, ĉar mi fidus vin. Neniu en la urbo ĝin scias kaj neniu devas scii...

— Ni trankviligis Vitorino-n: neniel ni transdiros, kion li rakontos al ni. Forta intuicio nin persvadis, ke li bezonas malŝarĝi la koron, ke li voias paroli kun iu pri siaj de longe retenitaj pensoj, ĉagrenoj kaj esproroj...

(Fino sur la proksima numero)

Recenzo

Sándor Szathmári — VOJAĜO AL KAZOHINIO. Eldono de Sennacieca Asocio Tutmonda, 57, avenue Gambetta, Paris 20^o Francujo. 1958. 1 vol. 320 p. 13,5 X 21 cm. Broŝ. Prezo ĉe la libroservo de BEL Cr\$ 600,00.

La manuskripto de ĉi tiu libro restis nepresita 21 jarojn kaj dum tiu tempo la mondo tiel fundamente ŝanĝiĝis, ke la aŭtoro certe jam ne pensas nun kiel li pensis tiam pri multo mokita de lia pesimismo, kiu kondamnas absolute ĉion kaj lasas al ni nenian esperon por la estonteco de la homaro.

La tuta verko estas alegorio ne facile komprenebla, kiu postulus komentariojn por la plej multaj legantoj, sed tiuj alegorioj estas pesimisme kaj ironie esprimataj: socialismo kreas por la homaro mortigan monotonecon, kiun li priskribas kiel infere teda, freneziga; kapitalismon li pentras kiel idiotan imperiismon destinitan malaperi kune kun la anglosaksa raso; religion li nur trovas en frenezulejo, plena de fanatikaj krimuloj, kiujn oni devis finfine ekstermi. Sin mem li prezentas kiel stultan patrioton kaj imperiiston.

Hodiaŭ anstataŭ trovi socialismon en insulo loĝata de tre kleraj homoj, kiuj tamen nenion scias pri la ekzisto de aliaj landoj, ne havas navigacion, aviadon, radion, beletron, muzikon, arton, kinon k. a., li fantazius tiun regnon sur alia planedo, kiun li vizitus per fluganta telero, kiel jam faris brazila verkisto, ĉar tie ĝi ne ŝajnus tiel stulte mallogika en nia tempo.

Antaŭparolo de K. Kalocsay plenigas ses paĝojn en bela stilo. La tuta verko estas originala en Esperanto.

Ni esperu, ke por la dua eldono la aŭtoro modernigu sian rakonton, trovu ian celon por la homa vivo, komentariu la malklaraĵojn, la preseraroj estu korektitaj.

Zofia Nalkowska — MEDALIONOJ. Tradukis el la pola lingvo Tadeusz Hodakowski. — La enkondukon tradukis Isaj Dratwer. — 1 vol. 110 p. 11 X 12 cm. Eldonejo "Polonia" — Varsovio, 1957. Prezo en la libroservo de BEL Cr\$ 220,00.

Ĉi tiu libro estas serio da rakontoj pri la kruelaĵoj de la hitleristoj dum la okupado de Pollando en la dua mondmilito. La invadintoj sklavigis, turmentis kaj mortigis tie milionojn da homoj en punlaboroj kaj koncentrejoj. Precipe la izraelidojn ili plej senkompate turmentis kaj ekstermadis po milionoj. Unue ili mortigis la infanojn kaj maljunulojn jam ne taŭgajn por krudaj laboroj, kaj kondukis la ceterajn al sklaveco kaj turmentado, kiu ĉiam finiĝis per morto. La homajn kadavrojn oni uzis por fabrikado de sapo.

Legante ĉi tiun libron oni preskaŭ tute malesperas pri la homa gento, kiu ŝajnas senrimede kruela kaj kreas inferojn por aliaj homoj kiel teruraj demonoj; sed konsiderante, ke la tuta mondo stariĝis kontraŭ tiuj krimuloj, ilin venkis kaj severe punis, oni reakiras iom da espero.

La Aŭtorino estas tre talenta verkistino; la traduko estas tre bona kaj la libro estas bele presita.

Al tiu eldonejo ni jam ŝuldas en Esperanto aliajn monumentojn el la pola literaturo.

Boro Pavlović — ELEKTITAJ POEMOJ. — El la kroata tradukis M. Demetrović, M. Mamuzić Z. Takać. Eldonis: Kroatia Esperanto-Ligo, Zagreb, 1954. Broŝ. 16 p. 12 X 17. Prezo Cr\$ 40,00 en la libroservo de BEL.

Malgranda kolekto da poemoj de nuntempa poeto en bona Esperanto, bone presitaj, en modesta prezento.

I.G.B.

André Ribot — COURS DE LA LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO — Eld. Editions Françaises d'Esperanto — 11, rue Paul-Vergnes, Marmande (Lot-et-Garonne), Francujo — 160 paĝoj — 12 cm X 16 cm — Prezo en la Libro-Servo de BEL Cr\$ 220,00.

Mi ĝojis kiam mi vidis tiun ĉi libron, ĉar la pligrandigo de Esperantaj lernolibroj montras la evoluon de la lingvo sur la instrukampo. Kaj fakte tiu ne estas la unua lernolibro por franclingvanoj.

La aŭtoro sukcesis kunigi ĉion necesan en 12 lecionoj plenaj de ekzercoj, ekzemploj, kaj ankaŭ de ilustraĵoj kaj eltiraĵoj el esperantaj gazetoj. Li ne nur donas la gramatikajn regulojn sed ankaŭ komparas ambaŭ lingvojn, klarigante kiel traduki la francaĵojn esperanten. En la fino de la verko, dulingva vortareto.

La gramatikajoj estas bone prezentitaj sed ie mi preferus jen pli grandigon de la klarigoj, jen malpli grandigon. Kiam ekzemple li traktas pri la genroj li diras, ke ĉiuj profesioj praktikataj de virinoj estas *inseksaj* kaj tiuj de viroj estas *virseksaj*. Mi

preferus ne aserti tion, ĉar ĝi povas naski miskomprenon. Sur la paĝo 100, kiam li parolas pri la "prepozicioj kun infinitivo", li forgesis citi *krom*; tamen li citis *antaŭ ol* kiel prepozicion. Bedaŭrindaj estas la neologismoj en Elementa Lernolibro, kiel ekzemple *divorci* (paĝo 21) netrovebla eĉ en PV.

Sed tio estas nuraj bagatelaĵoj apud la sennombraj kvalitoj de la verko.

L.A.M.

BIBLIOGRAFIO

MÉTODO ELEMENTAR DE ESPERANTO — (Para rádio especialmente) pelo prof. C. Torres Pastorino (catedrático de latim no Colégio Militar do Rio de Janeiro, do Colégio Pedro II). Com a colaboração do Prof. Jorge Soares das Neves. Segunda edição — 220 páginas. Liga Brasileira de Esperanto, Rio de Janeiro — 1959. Distribuidores: Irmãos Pongetti, rua Sacadura Cabral, 240 A, Rio de Janeiro. Prezo Cr\$ 150,00.

Jam de kelka tempo elĉerpigis la unua eldono de ĉi tiu lernolibro (speciale por perradiaj kursoj), menciita en nia numero de septembro-decembro 1957. Jen fine aperis la dua eldono, plibonigita, kiu certe havos la saman sukceson kiel la unua.

JARLIBRO DE UEA 1959 — *Dua parto*. 270 p. 11,5 X 15,5 cm. Ĝi enhavas raporton pri la agado de UEA en la laborjaro 1958-59 kaj Teknika Terminaro pri Ŝoseoj kaj Pontoj, verkita de ing. A. Broise.

K. Ossaka — MALGRANDA MONOGRAFIO PRI ESPERANTAJ PREPOZICIOJ. 1 vol. 419 p. bindita.

Tiu ĉi Malgranda Monografio estas vere granda verko, tre grava ne nur por la japanlingvosciantoj, kiuj volas ellerni Esperanton, sed grava ankaŭ por ĉiuj esperantistoj en la mondo, kvankam la klarigoj kaj tradukoj estas japanlingve.

Estas domaĝe, ke en nia nacia lingvo ni ne posedas similan verkon, kun miloj da ekzemploj kaj klarigoj.

POLAJ OKCIDENTAJ KAJ NORDAJ TERITORIOJ — *Zachodnia Agencja Prasowa*.

Bela broŝuro, bone presita, kun multaj bildoj kaj mapo, priskribanta la reakiron, en la jaro 1945, de polaj teritorioj, kiuj jam de multaj jaroj estis forŝiritaj post invado kaj kruela okupado. Sur tiuj teritorioj funkcias nun 21 superaj lernejoj, en kiuj studas pli ol 30.000 personoj.

M. Retot — ETA INTERPRETISTO FRANCA (*Turisma Frazaro*) 1958.

15-paĝa broŝuro por esperantistoj, kiuj ne scipovas la francan lingvon. Ĝi enhavas franclingvan frazaron plej tipan por la diversaj okazaĵoj de la vivo de turistoj, kun la prononco figurita per la esperanta alfabeto (kun aldono de kelkaj signoj).

AŬRORO — Sendependa kvaronjara Heroldo de Homar-Gvardio (sendependa universala socio por progresema esperantismo). Riedhof 357, Zurich, 49, Svisujo.

MIKSAĴOJ

La sola maniero atingi la veran feliĉon estas per la feliĉo, kiun oni donas al la aliaj.

Carlos Lacerda

La kritiko neniam mortigis tion, kio meritas vivi, kaj neniam vivigis tion, kio meritas morti.

Victor Cousin

Mi kredas en Dio, kiu kreis la homojn, sed ne en la Dio, kiun la homoj faris.

A. Karr

MODERNA ENCICLOPÉDIA PONGETTI JÚNIOR

PARA A JUVENTUDE - 1960 - IRMÃOS PONGETTI EDITORES

Rio de Janeiro.

Esta magnífica obra, traduzida e adaptada de *The Modern Encyclopaedia for Children* (Odhams Press, London) por Leonam de Azeredo Pena e João Benedito de Araujo, com numerosos desenhos de Percy Lau, cedidos pelo Conselho Nacional de Geografia, insere os verbetes:

ESPERANTO — Língua Internacional composta de palavras formadas de raízes das principais línguas de civilização e com uma gramática muito simples, que conta 16 regras sem exceção. O seu iniciador foi um médico polonês, Dr. Lázaro Luiz Zamenhof (1859-1917).

O Esperanto está divulgado em 82 países de todos os continentes, nêse se editam dezenas de revistas e já se publicaram mais de dez mil obras, originais e traduzidas. No Brasil o Esperanto é cultivado desde 1896, mas a sua difusão só se intensificou depois de 1907, com a fundação da Liga Brasileira de Esperanto.

ZAMENHOF — Lázaro — Médico polonês (1859-1917) inventor do Esperanto, língua internacional-auxiliar.

Sobre o preço do livro — Cr\$ 500,00 — os editores concedem o desconto de 10% aos membros da BEL que mencionarem esta qualidade.

D-ro L. L. ZAMENHOF

HONORIGITA DE UNESKO

La Plenuma Komitato de UNESKO (Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de la Unuĝintaj Nacioj), en sia lasta kunsido decidis meti D-ron L. L. Zamenhof en la liston de tiuj grandaj personecoj de la homaro, kies naskiĝan datrevenon UNESKO oficiale festas en la jaro 1960.

La iniciaton prenis la Naciaj Komisionoj de UNESKO en Brazilo kaj Japanujo.

Ni esprimas apartan dankon al IBECC (Brazilo Instituto por Edukado, Scienco kaj Kulturo), la brazila komisiono, kiu afable konsentis pri la peto farita de Brazilo Esperanto-Ligo kun tiu alta celo.

MONUMENTO A ZAMENHOF

Ao concurso aberto na Polônia para um monumento ao dr. Lázaro Luiz Zamenhof, em Bialistok, foram apresentados 21 projetos de escultores poloneses. Foram premiados três projetos, de números 5, 6 e 8, tendo a Comissão do Monumento escolhido o número 6, de Stanislaw Lisowski, para ser erigido o monumento. Os outros projetos serão expostos no Museu Zamenhof, em Bialistok.

XVII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

7-14 Oktobro 1961

Nia venonta Brazilo Kongreso, la XVII-a, okazos en Porto Alegre, Rio Grande do Sul, konforme al la rezolucio aprobata de la XVI-a en Salvador.

La agema Esperantista Societo de Porto Alegre kun entuziasmo kaj sindono prenis sur sin la gravan taskon organizi la Kongreson kaj pri tio intime interkonsentas kun B.E.L.

Porto Alegre mirinde respondas al la dezirataj kondiĉoj por Kongreso kaj la kapablo de la tieaj samideanoj el la najbaraj amerikaj landoj — Urugvajo, Argentino, Ĉilo.

Detaloj aperos en la estontaj numeroj de *Brazilo Esperantisto*. De nun decida vian aliĝon kaj partoprenon.

ELEKTITAJ POEMOJ DE CASTRO ALVES

Laŭ bela tradicio de la Brazilaj Kongresoj de Esperanto ĉiu Kongreso eldonas interesajn publikaĵojn, kiujn la Organiza Komitato donacas al la kongresanoj.

La freŝdata XVI-a Kongreso, okazinta en Salvador dum la Zamenhof-Jaro, sukcesis, ke la Universitato de Bahio pro afableco de ties Rektoro, Prof. Edgard Rego Santos, aperigis en Esperanto kolekton de poemoj de nia genia poeto Castro Alves, perfekte tradukitaj de alia talenta poeto, nia samideano Leopoldo H. Knoedt.

ELEKTITAJ POEMOJ aperas en feliĉa momento, kiam la afrikaj popoloj, kiujn Castro Alves elokvente prikantis konkeras sian sendependecon.

La grava verko, presita ĉe Gráfica Olímpica en Rio de Janeiro, estas dissendata senpage al la kongresanoj pere de B.E.L.

LINGUAPHONE

A famosa coleção de discos para o estudo de línguas.

Para o Esperanto — série de 16 discos duplos, acompanhada de livros com texto e explicações.

Cr\$ 10.000,00

Serviço de Livros da Liga Brasileira de Esperanto

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

FONDITA EN LA 29-a DE JUNIO 1906

SIDEJO: PRAÇA DA REPÚBLICA, 54 — RIO DE JANEIRO —
TEL.: 42-4357 — MALFERMITA EN LA LABORTAGOJ DE LA 8-a ĜIS LA
18-a. KUNVENOJ: SABATE DE LA 14-a ĜIS LA 18-a

KONVERSACIA KURSO — Kon- siderante, ke por korekte kaj flue regi Esperanton en la parola uzo estas necese regule lerni la konversacion, B.K.E. starigis konversacian kurson, kies gvidadon ĝi donis al nia sindona kaj kompetenta samideano S-ro Albertino Alves de Almeida. La kurso, kiu funkcias sabate de la 14.30 ĝis la 15.30, montriĝis ekde la komenco, 12-a de Marto, vikle kaj multe vizitata, ĉar granda nombro de samideanoj tuj komprenis la utilecon de tiu sistema lernado. En la kurso oni uzas la tre interesan libron "Esperanto per Instruaj Bildoj", de la fama kolekto "Fremdlingva Instruado Helpe de Bildoj" de Thora Goldschmidt, kiu perfekte taŭgas al la praktika celo de la lernado.

AFONSO CELSO — B.K.E. dediĉis sian kunvenon de la 2-a de Aprilo al la memoro de la eminenta brazilano Grafo Afonso Celso de Assis Figueiredo, kies unuan centjaron de naskiĝo oni celebris en la 31-a de Marto.

Li estis direktoro de la Fakultato de Juraj Sciencoj de Rio de Janeiro kaj fondinta membro de la Brazila Beletristika Akademio. Parlamentano, profesoro, juristo, verkisto, poeto, ĵurnalisto, oratoro, Afonso Celso ree montris sian fervoran simpatian al Esperanto per brilaj artikoloj en gazetoj. Li faris belege la oficialan paroladon ĉe la malferma kunsido de la III-a Brazila Kongreso de Esperanto en Petrópolis. En la memoriga kunveno de B. K. E. la Prezidanto, Prof. João Baptista de Melo e Sousa,

kiu estis amiko kaj lernanto de la granda homo, parolis kortuŝite kaj elokvente pri lia glora vivo kaj pri lia konstanta sincera apogo al nia idealo.

ELEMENTA kaj SUPERA KURSO — komenciĝis la 23-an de Januaro kaj la 12-an de Marto respektive sub la gvidado de niaj kompetentaj samideanoj S-ino Irene dos Santos Machado kaj Prof. Henerik Kocher.

DISDONADO de NORMAJ SUPERAJ DIPLOMOJ — Okazis la 13-an de Februaro la disdonado de diplomoj al la aprobotoj en la lasta supera ekzameno, kies nomoj troviĝas en la antaŭa numero sub la rubriko "Diplomoj".

Komisiite de siaj kolegoj, S-ino Irene dos Santos Machado elokvente esprimis ilian ĝojon, entuziasmon kaj dankon per la jena parolado:

S-ro. Prezidanto de Brazila Esperan-
[to-Ligo,

S-ro. Prezidanto de Brazila Klubo
[Esperanto,

Estimataj amikoj kaj samideanoj!

Fine, ni sukcesis alveni al la fino de nia kurso.

Turnante nian rigardon al la trairita vojo, ni, kun justa ĝojo, povas festi la atingitan celon, kaj taksu niajn klopodojn kaj penojn, multefoje faritajn per sinoferado de niaj amuzaj kaj ripozoj.

Hodiaŭ, niaj koroj ekflamiĝas pro ĝojo kaj entuziasmo.

Sed, ni ankoraŭ ne povas ripozi de niaj laboroj kaj taskoj.

La vivo estas konstanta aktiveco kaj senĉesa evoluado de niaj spiritoj. Nun, ni havas pli ol ĉiam, grandan respondecon ĉe niaj idealoj kaj ĉe niaj amikoj, kiuj homencas partopreni en nia glora movado.

En ĉi tiu momento, ni turnas nian rigardon kaj niajn pensojn al nia karega, sindonema kaj eminenta Majstro, kiu donacis al la homaro tiun admirindan kaj gloran rimedon, por la paco kaj la homa feliĉo.

Al ĉiuj, kiuj nin altiris al la movado, per siaj entuziasmaj verkoj kaj persistemaj laboroj, ni prezentas, niajn honorajn kaj humilajn dankojn. Pli ol ĉiam, iliaj sindonemaj ekzemploj estos por ni la plej granda instrumento por kuraĝigi niajn fortojn.

Al ĉiuj, kiuj laboras en la sidejo de nia Ligo kaj de nia loka Klubo, ĉiam afablaj kaj helpemaj, ni prezentas nian sinceran dankon.

Aparte, ni prezentas al nia karega kaj bona amiko — profesoro Henerick Kocher, — nian plej plej koran dankon, por liaj saĝaj lecionoj, kaj liaj lacigaj korektadoj de niaj taskoj. Tamen, malgraŭ ĉio, li ĉiam estis akurata, ĉiam preta por klarigi niajn dubojn, kaj atentigi nin pri niaj eraroj.

Amikoj, ni estas certaj, ke la konstanta pliboniĝado de Esperanto estos la natura imperativo de niaj revoj, pensoj kaj agoj, por ke ni povu, ne nur fruktuzi ĝin, sed, per ĝi, transdoni al ĉiuj, kiuj soifantaj, serĉas tiun radiantan lumon, tiun varman amon, tiun miregan ilon, kiuj alproksimigas kaj interfratigas la tutan homaron por la vera feliĉo.

Antaŭ ne longe, kiam ni festis kun granda ĝojo la jarcenton de la naskiĝo de nia neforgesebla Majstro, ni sentis, ke la esperantaj semoj ĝermas, kreskas, kaj rapide floras. De tio, ni esperas bonegajn rikoltojn de

maturigintaj fruktoj. El tiu panoramo, ni antaŭvidas novajn horizontojn, novajn perspektivojn kaj novajn fortojn kaj eblecojn, por ke ni povu plene triumfigi Esperanton, kiel la solan internacian lingvon de la tuta homaro — grandioza revo de niaj plej altaj idealoj, kaj signo de nova ciklo de ora civilizacio.

Ni devas do, kolegoj kaj amikoj, pacience studi tiun gloran lingvon, kun animo kaj fervoranta koro, kaj disvastigi ĉie tiun admirindan, flekseblan kaj belsonan lingvon.

La plimulto ne konas ĝin, nek scias taksu, kion ĝi prezentas por la paco kaj la homa feliĉo, kiujn ni deziregas, kaj kiuj naskigas el niaj koroj, kaj nur per la komuna lingvo povas atingi aliajn fremdajn korojn.

Ĝis nun, la interrilatoj de la landoj estas ĉiam limigitaj per la interpretistoj aŭ tradukistoj. La popoloj estas ĉiam submetitaj al la gravaj eraroj de la interpretadoj kaj malsukcesaj konsekvencoj, ĉar la interpretistoj ne povas transdoni la gestojn, la varmon de niaj koroj, la magnetismon de niaj okuloj, nek la perfektan sencon kaj nuancojn de nia dirmaniero.

Nur la komuna kaj universala lingvo povas doni al ni la fidelan komprenon de niaj pensoj kaj de la plej intimaj deziroj de niaj spiritoj.

Do, amikoj, ni laboru senĉese por nia afero kaj idealo, en ĉiuj regionoj, klasoj aŭ niveloj de nia homa socio.

Tiel farante, ni certe venkos kaj nia rekompenco estos la granda ĝojo, ke ni vidos la interfratiĝon de la tuta homaro, sub la egido de la paca laboro, per la konstanta progreso de la scienco kaj kulturo, de la komerco kaj industrio, de la arto kaj de la plej grava punkto, — la senĉesa nobleco de niaj spiritoj, en la senlima leviĝo al Dio.